

# IBERIA

## ESPERANTISTA

### REVUO

NUMERO 1  
JANUARO-FEBRUARO 1931

#### ENHAVO:

SALUTO . . . . .	
"HISPANA ANTOLOGIO" . . . . .	
DUA ELDONO DE "KATALUNA ANTOLOGIO" . . . . .	
LA ESPRESION LITERARIA EN ESPERANTO . . . . .	J. G. C.
TRI BENOJ . . . . .	K. de Kalocsay.
TRES BENEDICCIONS . . . . .	"
VI ESTAS LA PACO . . . . .	Gregorio Martínez Sierra.
AL AMATINO DORMANTA . . . . .	Artur Domènech Mas.
DIOJ DE MILITO . . . . .	Maurice Maeterlink.
AL JULIO BAGHY . . . . .	Jaume Grau Casas.
AL NIKOLAO HOHLOV . . . . .	"
AL K. DE KALOCSAY . . . . .	"
LA FORGESEMA SENDITO . . . . .	Renée Erdős.
BIBLIOGRAFIO . . . . .	
LA VESPERMANGO DE LA KARDINALOJ . . . . .	Julio Dantas.
RILATO KUN HOMOJ . . . . .	Prentice Mulford.
WALT WHITMAN . . . . .	Rubén Darío.
LA ESPERANTO-MOVADO EN IBERIO . . . . .	
EL MOVIMIENTO ESPERANTISTA MUNDIAL . . . . .	
ADMINISTRACIA AVIZO . . . . .	

DIPUTACIÓ, 50 - BARCELONA

**PROTEKTANTOJ**

de

**"IBERIA ESPERANTISTA REVUO"**

**S-RO NARCIS BOFILL, L. K.,** el Palma de Mallorca. Inĝeniero.

**S-RO MANUEL MAYNAR,** el Zaragoza. Advokato. Provinca Deputito.

**"Protektantoj" estas tiuj samideanoj, kiuj unufoje faras al "IBERIA ESPERANTISTA REVUO" donacon de 100 ptoj.**

# IBERIA ESPERANTISTA REVUO

DIPUTACIÓ, 50 - BARCELONA

APERAS DUMONATE  
JARABONO:  
POR IBERIO: 9 PESETOJ  
POR ALIAJ LANDOJ: 1 DOLARO

DIREKTORO:  
**JAUME GRAU CASAS, L. K.**

## SALUTO.

Eldonante la unuan numeron de "IBERIA ESPERANTISTA REVUO", ni konscias ke ni transiris Rubikonon. Ĉu montriĝos vivkapabla nia Revuo, en la formo kiun ni volis doni al ĝi?

Proverbo diras, ke, por konstrui preĝejeton, oni devas projekti katedralon. Imagu, kia ni konceptis nian Revuon, se ni sukcesis prezenti la nunan kajeron.

De antaŭ longaj jaroj ni pensadas, kio povus esti Esperanto-revuo subtenata de *ĉiuj* Iberiaj gesamideanoj, revuo ampleksa, spirite larĝa, komprenema, tolerema. Nun venis la tempo, ke *ĉiuj* Iberiaj esperantistoj, hispan—, portugal—, katalun— kaj basklingvaj elmontru ke nia revo estis efektivebla. Ili helpu nin kaj al ili ni donos ne promesojn, sed realaĵojn. Ni renversu la barojn, ĉiujn barojn, eksterajn kaj internajn! Ni havu fidon, ESPERON!

\* \* \*

Ni imagas, ke forpasis jam du jaroj, kaj "IBERIA ESPERANTISTA REVUO" havas sekuran vivon. Tiam oni demandos sin: Kiu dubis pri ĝia sukceso? Kiu kredis, ke

en Iberio ne estas laboremece, persistemeco? Kiu ne antaŭvidis la floradon de bela revuo, kun brila literaturo, kuraĝiga informado, konvinka propagando?

Por ke tiu imagaĵo iam estu realaĵo, *ĉiuj* filoj de Iberio helpu kaj subtenu nin.

\* \* \*

Kiun valoron havas *praktikuloj* senoptimismaj, kiuj *tusas la teron per siaj piedoj*? Neniu! Ili estas nura balasto. Ili opinias realigeblaj nur siajn proprajn ideojn. Aliuloj estas tro naivaj, iluziemaj, malinteligentaj. Nu, se ni tiom devus kalkuli, pesi kaj mezuri, ni ne okupiĝus pri aferoj de la spirito, ni ne partoprenus idealistan movadon, NI NE ESTUS ESPERANTISTOJ!

Do ni vokas prefere tiujn, kiuj havas grajnnon da kuraĝo en sia prudento, kiuj estas malavaraj en sia malriĉeco, kiuj ne ŝtoniĝis en sia praktikeco, kiuj sentas la poezion de l'iluzio, KIUJ HAVAS BONVOLON!

\* \* \*

Amikoj, esperantistoj, Iberianoj: divenu niajn *sentojn* kaj ne paroligu nin pri *programoj*. Kaj, ĉar ni baldaŭ interkompreniĝis, helpu nin laŭpove, abonu la "IBERIAN ESPERANTISTAN REVUON", kaj klopodu ke ĝi baldaŭ havu TRICENT ABONANTOJN tra LA TUTA IBERIO!

\* \* \*

Vi ja ne havas LA DEVON subteni nin. Sed ni estos tre dankaj al via FAVORO, kaj la kuniĝo de VIA kaj nia oferemo povos naski belajn kaj grandajn faktojn.

\* \* \*

Ni salutas *ĉiujn* Iberiajn gesamideanojn, la tutmondan diligentan kolegaron kaj speciale la esperantajn gazetojn. Ke niaj rilatoj estu intensaj, varmaj kaj fruktodonaj.

### "HISPANA ANTOLOGIO".

Ĉiuj konscias la gravecon, literaturan kaj propagandan, de esperantaj antologioj de la literaturo de ĉiuj popoloj. Ili ebligas rektan konon, profundan kaj ne supraĵan, pri la animo de la diversaj nacioj, kaj kompreneble helpas al la reciproka estimo kaj amo.

Ĝis nun aperis la antologioj pola, bulgara, kataluna kaj belga (lingvoj flandra kaj franca). Anoncas sin la antologioj sveda, estona, hungara kaj hispana, kaj certe sekvas pluaj. Kiu alia lingvo prezentos tiomajn eblecojn, kiom Esperanto, por la studado de la diversaj literaturoj? Ni estas certaj, ke en la estonteco iu filologo lernos Esperanton nur por profiti el tiaj taŭgaj informoj, ĉerpitaj el la fonto mem.

Pro sia malnova kaj brila tradicio, certe la hispana lingvo povas doni unu el la plej belaj antologioj. Ĉiuj samideanoj, kiuj siatempe legos la "HISPANAN ANTOLOGION", ne sole refreŝigos siajn universitatajn konojn filologiajn, sed ankaŭ troviĝos en rekta kontakto kun la hispana spirito, la malnova kaj la moderna, kaj faros interesajn konstatojn.

Do nia literaturemo havas praktikan valoron. Aliflanke, ni ne forgesu, ke por la internacia lingvo mem estas tre taŭgaj tiaj laboroj kaj elprovadoj. La iom-post-ioma *tradukado* de la diversaj literaturoj donos al Esperanto novajn nuancojn, pliajn riĉiĝojn.

Kalkulante je la helpemo de la Iberiaj gesamideanoj, nia revuo promesas eldoni, post du jaroj, la hispanan antologion. La preparaj laboroj multe progresas. Jen listo de kelkaj verkoj, kiuj, tute aŭ parte, troviĝos en la "Hispana Antologio". Kompreneble, ankaŭ aliaj verkoj, nun ne menciataj de ni, povos riĉigi ĝin, kaj tiucele ni petas la kunlaboron de ĉiuj samideanoj. La verkoj, kies titolon ni donas en Esperanto, estas jam plene tradukitaj. La verkoj, menciataj en hispana lingvo, estas tradukataj aŭ tradukotaj.

*Bartolomé Leonardo de Argensola*, Ho Don Juan, jen, time mi konfesas. *Lupercio Leonardo de Argensola*, Terura figuraĵo de la morto. *Arcipreste de Hita*, Libro de buen amor. *Miguel de Cervantes Saavedra*, Don Kiĥoto de la Manĉo. kelkaj ĉapitroj tradukitaj de Frederic Pujulá, José Suárez, Julio Mangada, Jaume Grau Casas, H. J. Bulthuis kaj Amalia Núñez. *Pedro Calderón de la Barca*, La urbes-tro de Zalamea; La niña de Gómez Arias; La vida es sueño;

Mañana será otro día. *Conde de Villamediana*, Feliĉon ĝuas nur la hom' amata. *Feliciana Enríquez*, Diris Amor', sidante ĉe la bordo. *Gutierre de Cetina*, Okuloj tre serenaj; Viajn belajn okulojn. *Luis de Góngora*, Al la urbo Córdoba kaj ĝia fruktriĉeco; A una rosa; Mientras por competir con tu cabello. *Garcilaso de la Vega*, Viaj ĉarmoj ĉe mi skribitaj restas; En fin, a vuestras manos he venido. *Infante Don Juan Manuel*, La grafo Lucanor. *Fray Luis de Granada*, Guía de pecadores. *Fray Luis de León*, La perfecta casada. *Lope de Vega*, La virino; Soneton de mi petas Violante; Peribáñez y el Comendador de Ocaña. *Francisco de Quevedo*, La edzo de virin' juna kaj bela; La urbo Kordovo; Quitar codicia, no añadir dinero. *Juan Ruiz de Alarcón*, La verdad sospechosa; Los favores del mundo. *Fernando de Rojas*, La Celestina. *San Juan de la Cruz*, Adónde te escondiste. *Santa Teresa de Jesús*, Al Kristo Krucumita; Y pues nada de lo dicho se llama amor con razón; Oh hermosura que excedéis; Vivo sin vivir en mí. *Sor Juana Inés de la Cruz*, Mi sopiras al vir' min ne amanta. *Tirso de Molina*, La venganza de Tamar. *Epopo*, Poema del Mío Cid. *Romancoj*, Amĉagreno; Ĉiama amo; Non me culpedes si he fecho mi justicia y mi deber; Rosa fresca, rosa fresca, tan garrida y con amor. *Popolaj Strofoj*, Iluzioj, knabino; Du kisojn mi rememoras. *Popolaj Kantoj*, Al blinda knab' mi sentis; Kanto de draŝisto; Centre de Amerik' fruktoporta; En Kubo, bela land'. *Azorín*, La kavaliro de la verda surtuto. *Pedro Antonio de Alarcón*, La Kristnasko de l' Poeto. *Jacinto Benavente*, La kreitaj interesoj, kaj aliaj dramoj tradukitaj de Vicente Inglada Ors. *Gustavo Adolfo Bécquer*, La sekaj folioj; Cerraron sus ojos. *Eusebio Blasco*, Arpeĝo. *Ramón de Campoamor*, La koncerto de l' sonoriloj; Pensoj; La opinio. *Rubén Darío*, Sonatino; Walt Whitman; La fatalo. *Joaquín Dicenta (hijo)*, Son mis amores reales. *Concha Espina*, La sfinkso Maragata. *José de Espronceda*, Al najtingalo; Marchitas ya las juveniles flores; Kanto de l' korsaro. *Luis Fernández Ardavin*, La dama del armiño. *J. González Olmedilla*, Granada; Kordovo. *Ricardo León*, Al fonto; El amor de los amores; La skolo de la sofistoj. *Eduardo Marquina*, La amika strato; Amo malproksima; Reveno; Mara eklogo. *Gregorio Martínez Sierra*, Vi estas la Paco. *Juan Meléndez Valdés*, Dorila. *Gabriel Miró*, La ĉerizoj de l' tombejo. *Pedro Mata*, Un grito en la noche. *Armando Palacio Valdés*, Los puritanos. An-

tonio Trueba, Kontrasto; Ondoĵoj el larmoj. *Emilia Pardo Bazán*, Los pazos de Ulloa. *Ramón D. Perés*, Vida de ensueño. *Miguel de Unamuno*, Mi clásica habla romántica; Del sentimiento trágico de la vida. *Ramón del Valle Inclán*, Sonatas. *Francisco Villaespesa*, El alcázar de las perlas. *María Paz Zamora*, La kristnaska donaco de l' Nunu (rakonto Filipina).

#### DUA ELDONO DE "KATALUNA ANTOLOGIO".

Post la sukcesa disvendo de la unua eldono de tiu ĉi grava verko, rekompencita de la Esperantista Akademio kaj atinginta la fervoran aprobon de la tuta esperanta gazetaro, la grava eldonejo EDITORIAL IBERICA, en Barcelona, entreprenis la duan eldonon sur luksa papero, en 1500 ekzempleroj, kun la samaj formato kaj aranĝo de la unua eldono.

Pro la peza laboro komposti per linotipo pli ol 400 paĝojn kun malgrandaj literoj kaj trifoje korekti la presprovaĵojn, kaj ankaŭ pro la kelksemajna Barcelona striko de la grafikaj artoj, tiu dua eldono de KATALUNA ANTOLOGIO ne povis ankoraŭ aperi, sed ĝi espereble aperos dum la februara monato.

La prezo de tiu verko estos 10 pesetoj, plus sendkostoj. IBERIA ESPERANTISTA REVUO vendos ĝin, kaj al niaj abonantoj el Iberio kaj Ameriko ni ne pagigos la sendkostojn. Al la Grupoj, kiuj aĉetos minimume 5 ekzemplerojn, ni konsentos 20 % rabaton, sed ili devos pagi la sendkostojn. Sendu (laŭ la adreso: S-ro J. Grau Casas, Diputació, 50, Barcelona) 9 pesetojn kiel jarabonon al I. E. R. kaj 10 ptojn, kiel pagon de unu ekzemplero de K. A.

## LA EXPRESIÓN LITERARIA EN ESPERANTO.

(Conferencia leída ante el micrófono de "Radio-Barcelona" el día 29 de diciembre de 1925.)

Al enumerar las ventajas que en todos los órdenes, pero especialmente en el orden de la cultura, ofrecería la adopción en todos los países de una lengua auxiliar internacional, acostumbramos los esperantistas a acentuar la perfecta aptitud del Esperanto como instrumento de expresión literaria.

Y esto, precisamente, es lo que más choca a los que no conocen exactamente qué es el Esperanto y no tienen idea del grado de difusión, relativamente asombroso, que ha adquirido ya en todos los países, especialmente en los del centro de Europa, donde el problema de la diversidad de lenguas se plantea con toda su crudeza y con toda su complejidad.

Llevados de un apriorismo y de un incompleto conocimiento del asunto, niegan algunos al Esperanto la posibilidad de vestir ideas algo elevadas, de expresar sutiles y delicados matices. Creen que el Esperanto, a lo más, quizá sirva para finalidades puramente comerciales, a manera de código ingenioso pero incompleto, y le atribuyen un carácter de cosa fría, sin alma, artificial, producto de laboratorio, especulación de filólogos y lingüistas desocupados.

Y, no obstante, el Esperanto es, en este aspecto concreto, una innegable realidad.

De las obras con que hoy por hoy cuenta la bibliografía esperantista (que ascienden a cuatro mil, un millar de las cuales es de verdadera importancia), la mayor parte son de carácter literario, cosa natural si se tiene en cuenta que éste era el único camino de *probar* la lengua, de darle toda la posible elasticidad. Sabido es que, para toda lengua, la existencia de una rica literatura es evidente signo de vitalidad.

Si bien la literatura esperantista cuenta con buen número de obras originales, se compone en su mayor parte de traducciones, hechas directamente de la lengua original por esperantistas de los respectivos países, lo cual es garantía de la mayor fidelidad.

Es digno de nota que entre estas traducciones se hallan no solamente las de las obras de los mejores autores de las grandes lenguas de cultura, sino también traducciones de



los autores de las llamadas "pequeñas naciones", que, por haber escrito en lenguas de área reducida, son conocidos de modo muy incompleto fuera de su propio país. En Esperanto se puede—cosa que no ocurre en algunas lenguas nacionales—leer al propio tiempo obras de grandes autores como Shakespeare y Goethe, y de autores no conocidos tan universalmente, pero de valor indiscutible, como, por ejemplo, el gran poeta húngaro Petofi y el gran poeta polaco Mickiewicz. Por medio del Esperanto se puede, mejor que por medio de algunas lenguas nacionales, trabar conocimiento, por ejemplo, con las joyas literarias de la lengua flamenca o con las interesantes curiosidades del folklore de Bulgaria.

Es ya tan importante el conjunto de bellezas literarias que pueden ser conocidas por medio del Esperanto, que bien puede decirse que ello constituye un caso estupendo de *aplicación práctica* de la lengua auxiliar por parte de los amigos de la literatura universal. No hay que olvidar que el Esperanto cuenta con sus propias revistas, con sus colecciones y con sus casas editoriales.

Después de estos antecedentes, nadie extrañará que los esperantistas catalanes hayamos querido incorporar al Esperanto el tesoro literario de nuestra lengua, por medio de la "Kataluna Antologio", antología de poetas y prosistas catalanes, antiguos y modernos.

El Esperanto se presta admirablemente para traducir la lengua catalana, puesto que ésta tiene una base eminentemente latina y en Esperanto las voces latinas se hallan en una proporción del sesenta por ciento, armónicamente dispuestas al lado de otras germánicas y eslavas. Para todas las lenguas en general, el Esperanto es un buen instrumento de traducción, pero nosotros hallamos, desde un punto de vista quizá algo original, una tan íntima semejanza, un paralelismo tan evidente, entre el Esperanto, modelo de perfección lógica y síntesis de las lenguas europeas, y el catalán, objeto modernamente de una sabia fijación y depuración filológica y al propio tiempo poseedor secular del espíritu y la grácil belleza de las lenguas neolatinas, que creemos que las traducciones al Esperanto de obras de autores catalanes, así por el entusiasmo con que han sido hechas, como por la excelencia de la lengua de Zamenhof, han de conservar para los lectores esperantistas de todos los países buena parte de la belleza original.

Viendo cómo se adapta magníficamente a la prosa antigua de Ramón Llull y Bernat Metge, al verso clásico de Ausias March y Jordi de Sant Jordi, el novísimo vestido de la lengua creada por Zamenhof, conservando no solamente la plenitud fundamental del significado, sino también la graciosa arquitectura de la forma sintáctica, se observa la unidad de la inteligencia humana a través del tiempo y del espacio, y la solidaridad de todos los hombres y de todos los pueblos.

Creemos que es perfectamente factible incorporar al Esperanto los valores universales de la literatura catalana y ofrecer en las traducciones, además de una completa fidelidad en el sentido, un reflejo de la forma, suficiente para que pueda ser apreciado el estilo propio del autor y el genio de nuestro idioma.

Es posible que alguien juzgue nuestra opinión exagerada y dude de que una lengua viva, popular, como la catalana, pueda ser traducida por una lengua artificial, como el Esperanto. Digamos de paso que esto de la artificialidad es una pura superstición, ya que el Esperanto es, en el fondo, tan natural como las lenguas nacionales, o, mejor dicho, éstas son tan artificiales como el Esperanto, pues el lenguaje no es un ser biológico o un producto natural, como metafóricamente se dice, sino un hecho de cultura, sometido a las convenciones de los hombres, que éstos pueden variar u ordenar por medio de una inteligencia, de una voluntad consciente. No todo ha sido hecho por el azar en la formación de las lenguas, como muchas veces se cree, sino que éstas han sido influidas en su evolución por las academias, por los grandes escritores y por las escuelas literarias.

Si el Esperanto es de creación artificial, esta creación, sin embargo, no es de ningún modo *arbitraria*, ya que la lengua auxiliar, por cuya propagación laboramos, se halla constituida por una gramática de una genial simplicidad, reflejo de las leyes generales comunes a todas las lenguas, y por un vocabulario compuesto de raíces extraídas de las lenguas más cultas, que puede ser enriquecido y ampliado hasta el infinito por cuanto el Esperanto posee un prodigioso sistema de formación de palabras, por medio de prefijos y sufijos de uso regular. La semejanza del vocabulario del Esperanto con el de las demás lenguas lo hace apto para la expresión poética y le suministra rimas, si bien en

menor número, de mayor elasticidad y pureza. Todo esto da al Esperanto una flexibilidad y una maleabilidad que sólo pueden ser comprendidas poniéndose a estudiarlo y convirtiéndose en uno de sus entusiastas. Por otra parte, el Esperanto es empleado en todos los países con una severa unidad, cuyo rigor no impide, sin embargo, la expresión original ni el atrevimiento estilístico.

No creemos que nadie que haya oído las anteriores consideraciones nos acuse de haber profanado las bellezas de la literatura catalana, por la cual sentimos, más que respeto y admiración, el amor de las cosas propias. Al poner en manos de hombres de todos los países las poesías de Maragall o de Verdaguer, de Guimerá o de Costa y Llobera, de Carner o de Guasch, las narraciones de nuestros mejores prosistas, nuestras canciones populares y fragmentos de nuestros dramas y tragedias, esperamos haber realizado una labor cuya trascendencia no es necesario ponderar. Con emoción hemos observado la simpatía que hacia nosotros despiertan en el corazón de hombres de apartados y mal conocidos países las poesías y las prosas de los escritores de nuestro país, que a pesar de todo ha sabido conservar la herencia de los trovadores y siente por fin la agitación interior de un fecundo renacimiento.

Esperamos que los señores radiooyentes alumnos del curso de Esperanto de esta emisora sabrán perdonarnos que no nos hayamos ceñido estrictamente al comentario de la "Antología Catalana" anunciado el pasado miércoles, sino que hayamos preferido disertar rápidamente sobre la literatura esperantista en general. Ustedes mismos podrán comprobar la certeza de nuestras afirmaciones, profundizando el estudio del Esperanto con la lectura de la "Kataluna Antologio", acerca de la cual sólo nos cabe decir finalmente que nos hemos dedicado a ella con todo el amor y todo el entusiasmo.

J. G. C.

## TRI BENOJ.

Benante levas manojn mi  
kaj diras al vi benojn tri.

Se post la vic' de grizaj tagoj venas  
momentoj kiam via viv' solenas,  
salutas vin ĉe via vojojando  
mirakloj de la Novo, Belo, Grando —  
konservu freŝon de l' animo sane,  
miru infane!

Se okulvitrojn nigrajn Viv' forĵetas  
kaj sur la kapon tintan ĉapon metas,  
strangaĵoj tiklas, pinĉas ŝercoplito  
kaj transkapiĝas farsa la spirito —  
la gajon ĵetu-ĵetu perlfontane,  
ridu infane!

Kaj se malĝojo, splen', ĉagren' vin jugas,  
se vin la horoj korve ĉirkaŭflugas,  
se koron vundas turmentantaj bruloj —  
ekfluu font' estinga el okuloj  
kaj viajn vundojn lavu ĝi mildbane,  
ploru infane!

K. DE KALOCSAY, L. K.

## TRES BENEDICCIONS.

Per fer ben pures tes accions  
vull dir-te tres benediccions.

Si passat tot un rengle de jorns grisos  
vénen moments que el viure és ple d'encisos,  
i sents en ton camí la meravella  
de tota cosa nova, gran i bella —  
conserva fresca l'ànima, mirant  
amb ulls d'infant!

Si amb vidres negres ja no veus les coses  
i al cap barret de cascavells et poses,  
et sents pessigolleig i esclata el riure,  
i el geni faceciós et vola lliure —  
sigui ton goig fontana perlejant,  
riure d'infant!

Si dolor i tristesa t'aclaparen,  
si les hores com corbs no et desemparen,  
si et corfereix ardor turmentadora —  
ragi dels ulls la font aquietadora  
que tes ferides anirà rentant  
com plor d'infant!

Trad. catalana de JAUME GRAU CASAS, L. K.

## VI ESTAS LA PACO, de Gregorio Martínez Sierra.

## I

Vespermezon ĉe la mezo de Aprilo; la printempo, kvankam malfrua ĉe l' montaro, sentigas jam sian bonan elspiron; flugetas la birdoj tra l' branĉoj, kiuj ekvestiĝas per folioj; ĉi tiuj branĉoj apartenas al la arboj de vastega ĝardeno, meze de kies arbodensaĵoj staras sinjore kaŝite la palacodomo de familio Aldana.

Ni alproksimiĝu: la vojetoj zorge sablitaj proponas al ni silentan kunkaŝemon: nek animon, nek bruon, krom la senĉese rapida pepado de birdoj kaj la bruetado de l' akvo en fontano, kiun oni ne vidas. Sur la sablo, la sunlumo de vespermezo kaj la ombroj de nuda branĉaro; ĉe ia deflanĝiĝo, neatendita flavoverdeco de amaso da arbustoj; pli malproksime, alia fortuanca verdeco de granda kvadrato el herbo, kaj sur ĝi la blankeco de unu sola migdalarbo tute floroplena; gracia estas la ombro de l' migdalarbo, tiel neforta sur la fortuanca verdeco, kaj ĝi alportas ideojn pri milda kareso, pri aromo delikata... ĉu aromo? Aerbloveto ekŝancelas la migdalujon, ĝian ombron, eĉ la herbon sur kiu ekfloris kelkaj lekantoj — de malproksime ni simple kredis, ke ili estas lumaj punktoj — kaj ĝi alportas kun si la parfumon de iuj violoj. Kie ili estas? Eble ili naskiĝis inter radikaro de malnova trunko, ĉe la bordoj de defluejo; tie sonas la akvo, malliberigita de tempo al tempo en brika kanalo, libera alifojojn sur sabla fluejo kaj puraj ŝtonetoj. Kiel gajiga estas akvofluo en ĝardeno! Ĉiam apud ĝi staras la plej grandaj arboj kaj la plej fortikaj arbustoj; kaj spite la multezorgo de l' ĝardenisto naskiĝas, kizante la akvon, herboj frenezaj, tre sukhavaj, tre freŝaj, kun kvazaŭ kristalaj trunketoj, kun tre longaj folioj, kiuj majeste sin kurbigas, ludante, ke ili estas palmoj; apud tiuj frenezaj herboj kuŝas la violoj; pompe ili etendas sur la plankon sian foliaran mantelon, kaj tie, ŝirmate, sin trovas la floro.

Dume, en la fluejo la akvo fluadas rapide por ĉirkaŭiri la ĝardenon; ĝin sekvante, oni lasas post si la herban kvadraton kaj la amason da arbustoj kaj la labirinton, kiu nun nuda, senfolia montras sian naivan trompon; kaj oni venas al poplejo de vasta kaj grandsinjora rekteco; de spaco al spaco ŝtonaj benkoj invitas al medita ripozado; kaj la pa-

santo sendube devas akcepti la inviton, ĉar en la rektolinio de aleo, sub la duobla vico de la poploj, ĉia meditado nobliĝas, kaj la pensoj naskiĝas kiel kolonoj el fumo kaj supreniras tra l' aero en vojo al lazuraĵo, kaj tiam en la malsupraj regionoj de l' animo, kiel sur la sablo de l' vojeto, fariĝas nobla, profunda silento. La animo forgesas sin mem, la pasiajn malkvietoĵojn de la vivo, kaj libere ŝvebas kun flugiloj etenditaj, sin lulante sub la ĉielo, en la lumo, en la aero, kun la internaj okuloj larĝe malfermitaj, komprenante sen parolbruo, amante sen helpo de formoj kaj emociiĝante sen fantaziaĵo pri ĝojoj kaj doloroj, kaj tiam ĝi estas *psiko*, tio estas, papilio.

Kie la poplaleo finiĝas, tie komenciĝas florbedo; buksoj kaj mirtoj limigas geometrie terspacojn, kie baldaŭ malfermiĝos la floroj; jam kelkaj hiacintoj ekvidiĝas per burĝonoj pale violkoloraj, kaj kelke da levkojoj, per aliaj orsimilaj; meze de la florbedo kuŝas tiu fontano, kies brueton oni aŭdis; ĝi estas larĝa fontejo je l' ternivelo, kaj en ĝia centro akvoŝpruco fiere stariĝas—kvazaŭ elirante el la starakvo mem, sen ia arkitektura artefaraĵo—kaj reen falas de tre alte, disgrajniĝante en gutojn, kiuj pro l' suno ĉielarke koloriĝas; tie estas du cignoĵoj kaj preskaŭ duona dekduo da anseroj blankaj, kaj ĉirkaŭ la baseno, florplenaj kreskaĵpotoj; la ĉielo blua pentras blue la akvon; kaj ĉe la tuta florbedo estas granda paco.

La palaco ŝtupe etendas tri terasojn sur la ĝardenon: en la plej alta malfermiĝas grandaj pordofenestroj kaj estas ankoraŭ pliaj florpotoj kun pli da floroj; la peronojn de tiuj terasoj oni devas malrapide supreniri, kiel en eleganta senokupa ripozo: ĉar ili estas faritaj por ke la virinoj kaj la pavoj paradu sur la blanka ŝtono de iliaj ŝtupoj la pompon de multnuecaj silkoj, tial estus granda profano ilin surpaŝi kun vulgara rapidemo; estas necese rimi ĉiun paŝon ĉe ĉiu ŝtupo per delikata elvoko pri floro, pri infano, pri virino, pri versoj aŭ pri muziko.

Jen, je l' mezo de la perono, tiu sama muziko, kiun ni estis elvokantaj, venas nin renkonti; tra la pordofenestroj de unu salono, kiuj estas larĝe nefermitaj, venas la sonoj de sonato: la ensorĉita palaco donas melodie la bonvenon. Kian figuron vi imagas kiel mastrinon de la salono, je l' sono de tiu muziko? Sendube virineton en la printempo de la vivo, eble grize aŭ blanke vestitan, certe kun aristokrataj manoj, kiuj estas kvazaŭ ambraj rozaj birdoj sur la

blanka kaj nigra eburo de la klavoj, kun okuloj, kiujn je l' takto de la sonato lumigas revo, kun lipoj, kiuj ridetas pro l' revo kiun la okuloj revas, kaj malfermetiĝas poste por trinki avide la varmetan aeron, kiu envenas el la ĝardeno. Ja dum tiu ĉi vespero, je tiu horo, kun tia lumo, en ĉi tiu printempo ŝajnas ke nur juna kaj iom poeziama virino povas esti disludanta tiun sonaton en tiu mirinda palaco.

Kaj tamen... La salono havas ian neoftan belan aspekton, kiu de post la unua momento diras laŭantikvan vivadon; la mebloj estas jarcentaj, profundaj, mallumaj, de nobelaj proporcioj; estas vere, ke, kvazaŭ konsolo por ilia antikveco, ĉie estas ridetoj de floroj; en la kavoj de ĉiuj fenestroj, sur la tabloj, apud la piedo de l' tabloj, ĉe la anguloj de la ĉambro estas grupoj de florplenaj potoj, azaleoj blankaj, azaleoj ruĝaj, kimoj moruskoloraj kaj discipline ordiĝintaj, blankaj steloj el lekantoj, siringoj tre palaj frutempe florigitaj per la varmo de forno; la aero estas tutplena de odoroj freŝaj, la lumo, brodita per aprilaj koloroj. Sed levu la okulojn: ĉe l' muroj, strangaj antikvotempaj ŝtofoj, kaj sur ili, kupraĵoj ankaŭ antikvaj; ĝi estas miriga kolekto el ĉizitaj teleroj — fiero iama de nobelaj almontrejoj —, el oferpokaloj, el kruĉoj, el strangaj meĉolampoĵ kaj relumiloj, el aspergiloj, el parfumujoj, el incensiloj; grandega kupra oleolampo sur la kamentubo; ornamoplena krado subtenanta la brulŝtipojn en la fajrujo; pendanta de l' kamentubo, la kaldroneto, kiu — laŭ tradicio — taŭgis al ŝpinantaj nobelinoj por akvumeti al si la fingrojn dum tordado de lino kaj lano; apud la fajro, dikventra bolpoto balanciĝanta ĉirkaŭ fera vergo; ĉio polurita, fulmebrilanta, miksanta en la lumo kun reflektoj de la floroj aliajn reflektojn dubeflavajn kaj verdsimilajn, reflektojn de aŭtuno, de vivo pasinta; tiel, sur la fanfaronan blankecon de iuj lekantoj falas velkintfoliokolora lumo, kiu estas preskaŭ funebro; kaj la koralo de iu azalea kreskaĵo reflektiĝas sur la kupron de iu telero, sed la gaja koloro paliĝas en la flaveco de l' indiferenta metalo, kaj okazas en la lumo batalado de nuancoj, neniam ĉesanta, inter tio antaŭ tre longe pasinta kaj tio apenaŭ naskiĝinta, batalado, kiu naskas en harmoniaj laŭgradecoj pacan nuntempon.

Dume la muziko silentis kaj virina voĉo elparolis simple tiujn ĉi vortojn:



—Dankon, Pedro.—Kaj aldonis poste kun akcentite senpacienca tono:

—Manuela, kioma horo estas?

—La kvina, mia sinjorino—respondis vira voĉo—. Manuela ne estas ĉi tie.

Ambaŭ voĉoj estas maljunaj kaj nesonoraj: tiu vira sonas apud la piano, tiu virina apud la kameno.

—Alvoku ŝin.

—Jes, sinjorino.

La viro sin apartigas de la piano kaj trairas la salonon; li estas sepdekjara kaj havas kamparanan mienon; portas tute razitajn kapoharojn: reale li estas sakristiano kaj orgenisto en la vilaĝa preĝejo. Dum siaj knabjaroj li studadis por fariĝi pastro: poste la amo igis lin forpendigi la robon, sed la puŝo de la primitiva inklino lin konservis sub la eklezia protekto, kaj la sutano, kiun li portis dum tri jaroj en seminario, lasis ĉirkaŭ lia korpo faldojn, kvankam nemateriajn, tamen sentebajn. Paŭze li skuas tirilon el brodita rubando kaj en malproksimo sonetadas sonorileto; alkuras pro l' alvokado alia maljunega virino.

—Ĉu ĉio estas preta?—demandas tiu sinjorino de la kameno.

—Ĉio, sinjorino, de post tiu mateno.

—Lia ĉambro estas tute pura?

—Mi mem ĝin purigis. sinjorino—respondas Manuela kun akcento de preskaŭ vundita fiereco.

—La lito aranĝita? Vi metis florojn?

—Fraŭlino Ana Maria sin okupis pri tio.

—Ĉu ŝi ne revenis ankoraŭ?

—Fraŭlino? Ne, sinjorino: ŝi iris al la vilaĝo, sed jam tuj revenos.

—Ĉu sinjorino volas—ekdiras la sakristiano—, ke mi iru al ŝi?

—Ne, ne: vi devas malsupreniri kun la veturilo al la stacidomo. Je kioma horo la vagonaro alvenas?

—Je la sepa kaj duono, mia sinjorino.

—Manuela. ĉu oni aljungis?

—Ankoraŭ ne, sinjorino; nur estas la kvina.

—Ke la horo neatendite ne pasu, kaj alveninte, li ne sin trovu sola.

—Sinjorino ne sin priokupu: je la sesa mi diros al Ramón, ke li aljugu.

—Je la sesa. je la sesa... kun kia trankvilo vi zorgas la

aferojn!— La voĉo senpacienca de la sinjorino fariĝas preskaŭ kolera: necese estas, ke Manuela certigu, ke Ramón tuj aljungos.

—Jes, jes; kaj revizitu zorge la ĉambron. Mi ne komprenas, kial Ana María foriris hodiaŭ al la vilaĝo.

—Ĉar estas dimanĉo, ŝi iris al ĉiudimanĉa lernejo, kiel ĉiam.

—Kiel ĉiam! Hodiaŭ ne okazas kiel ĉiam... Estus bone, se li alvenus kaj ne trovus ŝin ĉi tie. Rigardu de ĉe l' pordego, ĉu ŝi revenas.

—Tuj, sinjorino.

—Vi, ne, sed Pedro; vi, al tio, kion mi diris.

Pedro kaj Manuela eliras, ĉiu diversflanken. La sinjorino, jam sola, komencas nelaŭte entuziasman monologon.

Tiu sinjorino estas donja Margarita de Aldana. Ŝi estas okdekkvarjara, malgrandeta, vizaĝe malgrasa, spiritoviveca kaj persiste iluziema; la tempo, kiu respektis la freŝecon de ŝia animo, estis malpli kompata je ŝia korpo; jaron post jaro ĝi igis ŝin blinda kaj paralizita.

Estis donja Margarita dum siaj junjaroj, antaŭ tre multa tempo, la plej ĉarma, gaja kaj bela virineto, kiun oni povas imagi; se dubebone pentrita portreto, kiu montras ŝin en la floro de ŝiaj dudek majoj, ne mensogas, ŝi havis tiam okulojn nigrajn kaj babilajn, harojn brunajn, buŝon malgrandetan kaj sukcesan, frunton iomete konveksan kaj tri malicajn kavetojn ĉe la mentono kaj vangoj. Naskiĝinta kaj edukita ĉe la Montaro, malplej aĝa el la ses filinoj de multjara kaj malriĉa familio, laŭŝajne floris sur ŝi la tuta gajo perdiĝinta de kelkaj jarcentoj en ŝia tuta raso. En la malplenaj koridoroj, en la senornamaj ĉambroj, kie la nobela familio Aldana ŝirmadis de longa tempo la melankolion de sia malriĉeco, la senmotivaj ridoj de Margarita sonis kvazaŭ nekomprenebla muziko. Ŝia patro ne estis iam ridinta; ŝia patrino preskaŭ konsideris peko la ridon; el ŝiaj kvin fratinoj du fariĝis monaĥinoj kaj tri ne edziniĝis pro skrupulo sin montri afablaj al iu de ili nekonita viro; ŝi per siaj ridoj kaj siaj vangokavetoj gajnis la koron kaj la manon de unu duakuzo ŝia, Agustín de Aldana, kiu revenis de Kubo kun monplena poŝo.

Estis don Agustín viro jam matura, sed Margarita estis tamen tre feliĉa kun li; ili havis multajn filojn, same kiel ĉe la rakontoj; ili konstruigis la palacon, plantigis la ĝardenon; la fianĉino volis, ke en ĝi estu fontanoj kaj akvo-

fluoj, por ke la sonado de l' akvo ŝin helpu ridi; poste ŝi petis la cignojn, ĉar en la rakontoj, kiujn ŝi dum la infaneco legis, kutime estis cignoj ĉe la lagetoj; poste ŝi revis la aleon el poploj, kaj la poploj naskiĝis kvazaŭ dum ŝia revo; ŝi pensis alian tagon, ke la florplenaj kreskaĵpotoj estas kvazaŭ la animo de feliĉa hejmo, kaj la piastroj de don Agustín formigis ĉe angulo de l' parko palacon el fero kaj kristalo, kie floris ĉiuhore la floroj. Tiel la tuta domo estis kvazaŭ eĥo de la ridoj de tiu gaja virineto, kaj ŝiaj dudekkvin jaroj de edzeco estis por ŝi unu sola mateno plena de suno.

*(Finota.)*

Trad. el la hispana: JOSEP GRAU CASAS, L. K.

## AL AMATINO DORMANTA.

Dormu feliĉa! — dormu sen timo...  
                   se lipoj fajraj  
 ne vin el dormo — vekos per kiso.

Dormu... kaj songû! — ŝongû ke amo  
                   vin feliĉigas,  
 dum mi rigardos — vin kun ekstazo.

Ja, rigardante — vin tiel bela,  
                   mi revos... revos  
 al songôj viaj — revojn identajn.

Dormu... mi dume — ĝuos la kredon  
                   ke via songô  
 sentas l' influon — de miaj revoj.

\* \* \*

Songû je tiam — kiam la nokto  
                   nin eksurprizis,  
 inter la ombroj — de densa bosko..

Songû je tiu — ĵuro solena  
                   kiun atestis,  
 de l' alta trono, — la luno hela...

Songû je l' ŝmaco — de amkaresoj  
                   kiun ni ĝuis,  
 post jeso via, — sur mola herbo...

Songû je l' sorĉa — rava muziko  
                   de amaj vortoj...  
 songû brakpremojn... — kaj songû kisojn...

\* \* \*

De la senorda — blonda hararo  
                   la bukloj ŝajnas,  
 sur la kuseno, — ora kaskado...

brulas honteme — la vangoj ruĝaj,  
kvazaŭ du rozoj  
elfloriĝintaj — sur neĝo pura...

la rondaj brakoj — marmore blankaj,  
sur la littukoj  
ŝajnas por l' amo — ĵus malfermataj...

de l' neĝa brusto — la takta ritmo  
kaŝas... malkaŝas...  
misterajn ĉarmojn — sub la kovrilo...

\* \* \*

Jen... jen rideto — sur via buŝo...  
jen liberiĝas  
pluaj sopiroj — el via brusto.

Jen, malkvieto — jam vin ekscitas...  
viaj okuloj  
jam palpebrumas... jam malfermiĝas...

\* \* \*

Ĉu vi vekigis? — Kia ĉagreno!  
pri amfeliĉo  
elvaporiĝis — sonĝoj kaj revoj!

\* \* \*

Sed, ne! mi volas — pli longe revii  
kaj iluzion  
kaj amfeliĉon — pluan reteni.

Jen miaj brakoj! — jen miaj lipoj!  
donu la viajn...  
sonĝojn kaj revojn — ni plidaŭrigos!

ARTUR DOMÈNECH MAS.

## DIOJ DE MILITO, de Maurice Maeterlinck.

Milito prezentis ĉiam al homa meditado vastan kaj sensecese renovigatan temon. Bedaŭrinde, tre certe estas ke plejparto el niaj penoj kaj elpensoj ĉiam kuncelas ĝin kaj faras el ĝi kvazaŭ diablan spegulon kie reflektiĝas, inverse kaj kave, la progreso de nia civilizacio.

Mi volas hodiaŭ ĝin konsideri nur laŭ unu sola vidpunkto, por ankoraŭ unu fojon konstati kiel, ju pli ni ion konkeras al nekonataj fortoj, des pli ni submetiĝas al ili. Tuj kiam en la nokto aŭ ŝajna dormado de la naturo ni perceptis ian eklumeton, ian fonton de nova energio, tre ofte ni fariĝas ĝiaj viktimoj kaj preskaŭ ĉiam ĝiaj sklavoĵoj. Oni dirus ke, pensante nin liberigi, ni liberigas timindajn malamikojn. Estas vere, ke tiuj malamikoj fine lasas sin konduki kaj liveras al ni servojn, kiujn ni jam ne povas plu flankenlasi. Sed apenaŭ unu el ili submetiĝis, kiam en tiu ĉi momento mem ĝi kondukas nin al la vojo de senfine pli danĝera malamiko, kaj nia sorto fariĝas tiel ĉiufoje pli kaj pli malcerta. Inter tiuj malamikoj, cetere, iuj troviĝas laŭŝajne tute nedreseblaj. Sed eble ilian obstinecon kaŭzas nur tio ke ili, pli ol la ceteraj, scias flati malbonajn instinktojn de nia koro, kiuj malfruas de kelkaj jarcentoj kompare al la venkoj de nia intelekto.

\* \* \*

Precipe tiel okazas koncerne plej grandan nombron da primilitaj elpensoj. Ni tion vidis en ĵusaj kaj monstraj konfliktoj. Por la unua fojo, de la komenco de historio, tute novaj potencoj, potencoj fine maturaj kaj elpaŝintaj el ombro de preparaj jarcentaj spertoj, venis anstataŭi la homojn sur la batalkampo. Ĝis lastaj militoj, ili nur iom malsuprenvenis, tenis sin aparte kaj agadis de malproksime. Ili hezitudis trudi sin, kaj ankoraŭ iom da parenceco ekzistis inter ilia nekutima efiko kaj tiu de niaj propraj manoj. La atingebleco de pafilo ne superis tiun de nia okulo, kaj la detruanta energio de plej mortiga kanono, de plej timinda eksplodilo, konservis ankoraŭ homan mezuron. Hodiaŭ oni preterlasis nin, ni definitive abdikis, nia regno estas finita, kaj jen ni liveritaj, kvazaŭ sableroj, al la monstraj kaj enigmaj potencoj, kiujn ni kuraĝis voki al nia helpo.

\* \* \*

Ĉiutempe la homa partopreno en bataloj estis ja la malplej grava kaj malplej decidiga. Jam, en tagoj de Homero, la Olimpaj dioj miksis sin al la mortuloj sur la Trojaj ebenaĵoj, kaj preskaŭ nevideblaj sed aktivaj meze de sia arĝenta nubego, regis, ŝirmis aŭ timdisigis la militistojn. Sed ili estis ankoraŭ tre malfortaj kaj ne tro misteraj dioj. Kvankam ilia interveno ŝajnis superhoma, ĝi tamen akceptis homan formon kaj psikologion. Iliaj sekretoj moviĝis en la orbito de niaj malvastaj sekretoj. Ili devenis el la ĉielo de nia intelekto, ili havis niajn pasiojn, niajn mizerojn, niajn pensojn, apenaŭ iomete pli justajn, pli altajn kaj purajn. Poste, ju pli la homo marŝadas en la tempo, ju pli li vekiĝas el iluzio, ju pli lia konscienco plivastiĝas, ju pli la mondo senvualiĝas, des pli la dioj kiuj lin akompanas pligrandiĝas sed malproksimiĝas, fariĝas pli malklaraj sed pli nereteneblaj. Ju pli li lernas, ju pli lia kono vastiĝas, des pli la amaso da nekonataĵoj almitas lian regnon. Ju pli la armeoj organiziĝas kaj ampleksiĝas, ju pli la armiloj perfektigiĝas, ju pli la scienco progresas kaj sklavigas la naturajn fortojn, des pli la sorto de batalo forglitas el la mano de la estro por obei al grupo da nedecifreblaj leĝoj nomataj ŝanco, hazardo, destino. Jen, ekzemple, ĉe Tolstoj, la admirindan scenon, kiun oni sentas aŭtentika, de la batalo de Borodino aŭ de la Moskova, tipo de unu el la grandaj bataloj de la Imperio. Ambaŭ estroj, Koutouzof kaj Napoleono, tenas sin je tiom da distanco de la batalo, ke ili povas percepti nur sensignifajn epizodojn kaj preskaŭ nenion scias pri la okazaĵoj. Koutouzof, kiel bona slava fatalisto, konscias pri "la forto de la realo". Tre dika, unuokula, dormetema, lace kuŝiĝinta antaŭ kabano, sur tapiŝkovrita benko, li atendas la finon de la aventuro, donas neniun ordonon, kontentiĝas nur konsenti aŭ ne konsenti al tio al li proponita. Sed, Napoleono, tiu vantas direkta okazaĵojn kiujn li eĉ ne vidas. Antaŭtagon, vespere, li diktis la ordonon de la batalo; sed, post unuaj implikiĝoj, pro tiu sama "forto de la realo" al kiu sin liveras Koutouzof, neniu el tiuj antaŭpreparoj estas nek povas esti entreprenata. Tamen, fidela al sia imaga plano, kiun la realeco tute aliformigis, li kredas doni ordonojn kaj efektive sekvas nur, malfruante, la ordonojn de la ŝanco kiuj ĉie antaŭiras liajn staboficiojn furiozajn kaj frenezigiĝintajn. Kaj la batalo sekvas sian vojon ordonitan de la naturo,

kvazaŭ rivero fluanta, kiu neniel atentis la kriojn de la homoj kunvenintaj apud ĝiaj bordoj.

\* \* \*

Tamen, Napoleono, el ĉiuj generaloj el niaj lastaj militoj, estas la sola kiu laŭŝajne montras ankoraŭ homan direktadon. La fremdaj fortoj, kiuj kunhelpis liajn armeojn kaj jam ekregis ilin, apenaŭ elpaŝis el sia infaneco. Sed hodiaŭ kion li farus? Ĉu li sukcesus repreni la centonon de la influo kiun li havis sur la sorto de l' bataloj? La idoj de l' mistero pligrandiĝis ja nun, kaj aliaj dioj estas kiuj pendas super niaj soldatoj, pelas kaj disigas niajn taĉmentojn, rompas niajn vicojn, ŝancelas niajn fortikaĵojn kaj alfundigas niajn ŝipojn. Ili ne plu havas homan formon, ili elpaŝas el la plejunua haoso, ili venas el multe pli malproksime ol iliaj antaŭuloj, kaj ilia tuta potenco, iliaj leĝoj, iliaj intencoj troviĝas ekster la rondo de nia propra vivo kaj ekster la sfero de nia inteligenteco, en absolute fermita mondo, mondo plej malamika al celoj de nia speco. la senforma kaj senanima mondo de inerta materio. Kaj jen al tiuj blindaj kaj timindaj nekonatoj kiuj havas kun ni nenion komunan, kiuj obeas al impulsoj kaj ordonoj tiel nekonataj kiel tiuj regantaj plej fabele malproksimajn astrojn; al tiuj nekompreneblaj kaj nekontraŭstarcbraj energioj ni forcedas la taskon solvi tion, kio estas plej propre, plej ekskluzive rezervata al plej altaj talentoj de la formo de vivo kiun ni solaj reprezentas sur la tero; al tiuj neklasigeblaj monstroj ni fordonas la preskaŭ dian taskon plilongigi nian racion kaj apartigi juston kaj maljuston...

\* \* \*

Al kiuj potencoj ni liveris do niajn specajn privilegiojn?—Kelkafoje mi revas, ke unu el ni estas provizita per okulo kiu perceptas ĉion evoluantan ĉirkaŭ ni, ĉion pleningantan tiujn helaĵojn kie niaj rigardoj flosas kaj kiujn ni kredas travideblaj kaj malplenaj, kiel blindulo — se la ceteraj sentiloj ne maltrompus lin — kredus malplenaj la malhelaĵojn kiuj ĉirkaŭpremas lian frunton. Ni imagu ke li traboras la surfacon de tiu kristala sfero kie ni vivadas kaj kiu ĉiam reflektas nur nian propran vizaĝon, niajn



proprajn gestojn kaj niajn proprajn pensojn. Ni imagu ke iun tagon, trans ĉiuj ŝajnaĵoj kiuj nin malliberigas, ni atingas fine la esencajn realaĵojn, kaj ke la nevideblo kiu ĉie ĉirkaŭvindas nin, nin subpremas, nin restarigas, nin puŝas, nin haltigas aŭ nin repelas, senvualigas subite la grandegajn, malbelegajn, nekonscieblajn bildojn, per kiuj certe sin montras, en angulo de l' spaco, la naturaj leĝoj kaj fenomenoj kies rompeblaj ludiloj ni estas. Ni ne diru ke tio estas nur revo poeta; estas nun, kiam ni volas mem konvinki nin ke tiuj leĝoj havas nek formon nek vizaĝon kaj tiel facile ni forgesas ilian ĉiopovon kaj senlacen ĉeeston, estas nun kiam ni estas en la revo, en la tute malgranda revo de homa iluzio; kaj estas tiam kiam ni enirus en la eternan veron de la vivo sen limoj kie sin banas nia vivo. Kia pezeganta spektaklo kaj kia malkaŝo kiu per teruro frapus kaj senmovigus en la fundo de ĝia neniaĵo la tutan homan energion! Ĉu vi vidas, ekzemple, inter tiom da iluziaj triumfoj de nia blindeco, ĉu vi vidas tiujn du ŝiparojn kiuj preparas sin por batalo?—Kelkaj miloj da homoj, tiel nepercepteblaj kaj senefikaj super la realeco de la ludontaj fortoj kiel aro da formikoj en sovaĝa arbaro, kelkaj miloj da homoj flatas sin aljungi kaj utiligi, profite de ideo fremda al universo, plej nemezureblajn kaj plej danĝerajn el ĝiaj leĝoj. Provu doni al ĉiu el tiuj leĝoj aspekton aŭ fizionomion proporcian kaj alĝustigitan al ĝia forto kaj funkcioj. Por jam komence ne puŝiĝi kontraŭ neeblaĵo, neimageblaĵo, lasu, se vi timas, la plej profundajn kaj la plej grandiozajn, inter aliaj tiun de la gravitado, al kiu obeas la ŝipoj kaj la maro kiu portas ilin, kaj la tero kiu portas la maron, kaj ĉiuj planedoj kiuj subtenas la teron. Vi devus serĉi tiel malproksime, en tiel grandaj solecoj, en tia senfinco, trans tiel malproksimaj astroj, la elementojn, el kiuj ĝi konsistas, ke la tuta universo ne sufiĉus por doni al ĝi vizaĝon, nek iu revo por doni al ĝi akceptindan aspekton.

\* \* \*

Ni celu nur la plej limigitajn, se nur iuj ekzistas kiuj konas limojn, la plej proksimajn al ni, se nur iuj troviĝas proksime. Ni limigu nin momente al tiuj kiujn la ŝipoj juĝas subigitaj al siaj flankoj, al tiuj kiujn ni kredas speciale obeemaj kaj idoj de niaj faroj. Kian monstran vizaĝon, kian gigantatan ombron ni aljuĝos, por nur pri unu pa-

roli, al potenco de eksplodiloj, novaj kaj plej altaj dioj, kiuj ĵus detronigis, en la milittempoj, ĉiujn antikvajn diojn? El kie, el kiuj profundoj, el kiuj nesonditaj abismoj elŝprucas tiuj demonoj ĝis hodiaŭ neniam vidintaj la tagan lumon? En kiu familio de teruroj, en kiu neantaŭvidebla grupo de misteroj ni devas ilin klasigi? Melinito, dinamito, panklastito, kordito kaj roburito, lyddito kaj balistito, nepriskribeblaj spektroj, apud kiuj la maljuna nigra pulvo, teruro de niaj patroj, la fulmo mem, kiu por ni reprezentis la plej tragedian geston de la dia kolero, aspektas kvazaŭ bonaj virinoj iom babilemaj, iom batalemaj, sed preskaŭ neofendemaj kaj preskaŭ patrinecaj! Neniu ektuŝis la plej malgravan el viaj sennombraj sekretoj, kaj la ĥemiisto kiu aranĝas vian dormon, tiel profunde kiel la inĝeniero aŭ artileriano kiu vin vekas, ne konas vian naturon, vian devenon, vian amon, la risortojn de viaj nekalkuleblaj ekpuŝoj kaj la leĝojn eternajn al kiuj vi tiel subite obeas. Ĉu vi estas la ribelo de la aĵoj nememoreble malliberaj? Ĉu la brilanta transformiĝo de la morto, la teruriga gajeco de la skuiĝanta neniaĵo, la elŝpruco de la malamo, aŭ la eksceso de la ĝojo? Ĉu vi estas nova formo de vivo kaj tiel arda ke ĝi forbruligas en unu sekundo la paciencon de dudek jarcentoj? Ĉu vi estas ekbrilo el la monda enigmo kiu trovis fendon en la leĝoj de l' silento kiuj ĝin premadas? Ĉu vi estas sentima prunto al rezervo de energio kiu subtenas nian teron en la spaco? Ĉu vi amasigas en la daŭro de palpebrumo, por senegala eksalto al nova celado, ĉion prepariĝantan, ĉion kuniĝantan en la sekreto de rokoj, maroj kaj montoj? Ĉu vi estas animo aŭ materio aŭ tria stato ankoraŭ sennoma de la vivo? El kie vi ĉerpas la fervoron por viaj detruadoj, al kie vi apogas la levilon kiu fendas kontinenton kaj el kie iras via eksalto kiu povus preterpasi la stelaran spacon kie la tero via patrino aplikas sian volon? Al ĉiuj tiuj demandoj la saĝulo kiu vin kreas respondos simple ke "via forto devenas de la subita naskiĝo de granda gasa volumo en tro malvasta spaco por ĝin teni sub la atmosfera premo". Tio ĉi evidente respondas ja ĉion, ĉio estas jam klara. Ni vidas tie la fundon de la vero, kaj ni scias de tiam, kiel pri ĉio, kun kio ni havas aferon.

Trad. el la franca: MARIAN SOLĂ, L. K.

(Premiita de la "Internaciaj Floraj Ludoj".)

## I

## AL JULIO BAGHY

Per *frosto, mizero, veado* kaj *larmo*  
kovriĝas la perloj de via *inspir'*.  
Sed tamen en ili ne estas malvarmo:  
nur — arda *sopir'*!

Sopiro je nobla, perfekta homaro,  
ne plu makulita de *sang'* kaj *mizer'*;  
de paco, justeco, *feliĉ'* — granda maro  
tra tuta la *ter'*.

Deziro je frata rilat' inter homoj  
kaj inter popoloj; de *vir'* al *virin'*;  
amema kunigo de ĉiuj *atomoj*  
de l' spaco sen *fin'*.

Kaj *dume kor' via* — la centro de *Amo* —  
suferas pro ĉia *doloro* kaj *ĝem'*.  
Sed ĉiu *fajrero* de via *korflamo*  
fariĝas *poem'*!

## II

## AL NIKOLAO HOHLOV.

Kun formo perfekta — laŭ greka statuo —  
aperas la kanto de via fervor';  
de ritmo, majesto, plastik' — triunuo:  
poeta trezor'.

Sub vervo trankvila. esprimo serena  
sin kaŝas eksplodo de forta pasi',  
vulkano de justaj postuloj tutplena,  
sed ja — harmoni'.

En via vers' flua, parol' diafana,  
ideoj kaj sentoj estiĝas kristal';  
kaj via vort' estas vok' samideana  
al mondideal'.

Ei via lir' sonas ĉiela muziko  
dolĉege reviga pri sorĉoj, fabel'.  
Agordas la liron surtera mistiko:  
adoro al Bel'!

## III

## AL K. DE KALOCSAY.

Kun spiro profunda, fekunda inspiro.  
vi supren leviĝas al alta Parnas',  
per viglajflugiloj kaj forta deziro  
de nova Pegas'.

En strofoj ĉizitaj aŭ krioj liberaj,  
kun ĝoj' intelekta aŭ koremoci',  
vin ravas la koto de vivoj tre teraj  
aŭ Mitologi'.

Vi estas koloso de nia liriko,  
kun forto kaj digno, kun amo kaj vol':  
post viaj verkaĵoj estiĝos klasiko  
por nia popol'.

Popol' al vi mankas: al ni — la Homaro!  
Sed la naskiĝanta mondliteratur'  
proklamos vin iam moderna Pindaro  
de l' monda kultur'!

JAUME GRAU CASAS, L. K.

### LA FORGESEMA SENDITO, de Renée Erdős.

La ĝardenoj staris blankaj en la lunlumo, kiam la Junulo alvenis sur la Teron.

Li etendis siajn brilantajnflugilojn, subiteflugfalis kaj haltis sur unu ŝtonmuro.

Li turnis supren por momento sian vizaĝon kaj rigardis en la bluaĵon de l' nokta ĉielo, poste rigardis en la ĝardenon kaj ridetis.

Liajflugiloj, belaj, fortaj, grandajflugiloj ekmoviĝis kaj pelis al lia vizaĝo la mildan bonodoron, kiu venis al li de malsupre, el direkto de la fontanoj.

La Junulo ventumis sin per siajflugiloj, staris ridetante sur la lunluma ŝtonmuro kaj rigardis malsupren. La ĝardeno dormis tie en la nokta lumo kaj ĝiajfloroj sonĝis sub la roso.

La akvo de l' fontano perlĵetante ŝprucis kaj la rozoj, diantoj kaj blankaj jasmenoj eksentis la proksimecon de la Junulo kaj subite vekigis...

La Junulo vidis la moviĝon kaj ekstremon de l' petaloj. Li vidis la fermitajnflorojn timeme kaj scivoleme malfermiĝi. Li vidis, ke la floroj kun siaj misteraj noktaj rigardoj nun ĉiuj lin rigardas. La Junulo denove ekmovis siajnflugilojn kaj flugis de la ŝtonmuro en la ĝardenon. Tiu ĉi estis la plej bela ĝardeno en Nazaret. La plej riĉa kaj plej prizorgita.

Kaj la Junulo, kiu estis sendita, nun komencis serĉi inter la floroj.

Kiam li iris laŭ la ĝardenaj vojoj, ĝemoj flugis al li el la laŭboj.

—Min elektu!—diris la abundaj, grandaj, blankaj rozoj, kiuj ĉirkaŭis la blankajn marmorkolonojn de la kioskoj.

La Junulo balancis sian blondbuklan kapon kaj gracie, radiante pluen rapidis kun siaj ripozantajflugiloj. Li serĉis inter la floroj...

—Min elektu!—diris la bonodoraj diantoj kaj etendis al li siajn tremantajn kapojn.

Grandaj sangruĝaj kaj purpurpetalaj rozoj sopire ĝemis al li:

—Junulo, kiu estas sendita pro la Saluto, min elektu!—Sed la Junulo iris pluen kaj serĉis inter la floroj.

Kaj ekparolis laŭvice la floroj de la riĉa ĝardeno.

La nimfoj, kiuj naĝis sur la akvo de l' fontanoj, kiel

grandaj akvopapilioj... Ilia sopiro estis milda, kiel ilia korpo kaj ilia voĉo peteganta:

—Ni estas la pureco kaj mildeco. Junulo nin elektu!—

Sed li denove ekbalancis sian blondbuklan kapon kaj movetante siajn grandiozajnflugilojn iris pluen.

La ĝardeno staris en sia printempa pompo kaj alparolis lin la perlaĝlicinoj kaj parolis la rigidaj, fieraj irisoj kaj ĉiuj humilaj violoj kaj plenaj pentekostaj rozoj:

—Junulo nin elektu!—

Sed li, la Sciiganto iris pluen sur la vojoj de la ĝardeno kaj ne tuŝis la florojn, ĉar li ne trovis inter ili kion li serĉas.

—Tiu ĉi estas en Nazaret la plej riĉa ĝardeno, — li pensis — kaj ne floras en ĝi floro, kiu estus inda al Ŝi! Ni iru pluen!

Kaj li etendis siajnflugilojn kaj ekflugis, forlasis la riĉan ĝardenon, kies floroj vidante lin malaperi, lace kaj honteme klinis sian kapon. Ili estis malfeliĉaj kaj volis morti. Tiel granda estis en ili la deziro: esti deŝirata per la mano de l' Anĝelo, ke ili ploris maldolĉajn larmojn en sia doloro.

Kaj la Junulo flugis pluen super la ĝardenoj en la lunlumo. Ofte li ripozis sur la ŝtonmuroj kaj ofte li malsupren flugis en la ĝardenojn, sed nenie li trovis la floron, kiun li serĉis.

Kaj la mateno proksimiĝis jam kaj la Anĝelo estis laca pro la longa vojo, pro la longa serĉado. La steloj komencis paliĝi kaj la bloveto de l' milda vento anoncis la proksimiĝon de l' aŭroro.

La Anĝelo estis senespera kaj pensis:

—Ĉu tiel mi devas iri al Ŝi? Ĉu mi devas saluti kun malplenaj manoj la estontan reĝinon de ĉielo? Ĉu tiel mi devas iri al la belulino de l' belulinoj, ke parolante al Ŝi mi ne havos la simbolon de l' Honoro en miaj manoj?

Kaj malĝoje li direktis sin al tiu urbparto, kie estis la domoj de malriĉuloj, por serĉi Ŝin, al kiu li portis la Saluton. Por serĉi Ŝin kaj transdoni la Saluton komisiitan al li. Kaj irante, la ĉiela migranto trovis vojeton, kiu kondukas al la lastaj domoj de la urbo. Preter la vojeto floris kampofloroj kaj la Junulo malĝoje klinis sin al ili kaj rigardis ilin. Ili estis belaj, ĉarmaj, sed tro modestaj por saluti per ili la reĝinon de l' ĉielo.

Kaj la Junulo pensadis, ke la ĝardenoj de la ĉielo estas

plenaj de mirindegaj floroj kaj ke tre forgesema li estis ne ŝirinte floron tie kaj ne kunportinte sur la Teron! Li devus esti pensinta, ke al Ŝi, al la Elektita, kiun la plej granda kaj brila virina sorto atendas, li devus montri sian estimon per la floroj de l' ĉielo, per la plej belaj, plej blankaj, plej bonodoraj.

Ĉar jen, sur la Tero li vane serĉis! En ĉiuj ĝardenoj de tuta Nazaret li ne trovis tian floron, kiu estus inda por transdoni al Ŝi.

Pensante pri tio li tre malĝojiĝis kaj eksidis sur la vojeton inter la florojn.

Iomete li sidis tie kaj tiam sentis, ke li estas tre laca kaj tre dormema pro la longa vojo, kaj longa serĉado. Li etendis siajn flugilojn sur la herbon kaj kuŝiĝis sur ilin, klinis sian kapon kaj ekdormis.

Dormis la Sendito de la ĉielo en la lumo de l'aŭroro, inter la kampofloroj, dum ĉirkaŭ li iom post iom vekiĝis la tuta naturo.

Vekiĝis la abeloj, fruemuloj. La papilioj, kiuj devas rapidi por vivi sian koloran, mallongan vivon. Vekiĝis la skarabetoj kaj orflugilaj libeloj ĉiuj. Kaj vekiĝis la birdoj ankaŭ kaj rigardis la Dormanton, kiun ekregis la laceco kaj dormo...

Ili rigardis lin kaj demandis sin: Kiu estas li, kun la brila vizaĝo? Kaj kial li dormas sub la leviĝanta suno?

Kaj la etaj popoloj de la naturo ĉirkaŭzumis, ĉirkaŭpepis kaj ĉirkaŭkantis la dormanton, sed li ne vekiĝis.

Li havis profundan, pezan sonĝon, kian havas nur la sendito de l' ĉielo, kiam li havas tre gravan komision. Li sonĝis, ke li eniris la domon de l' Virgulino kaj trovante ŝin sola, genuis antaŭ Ŝi kaj ekparolis:

—Saluton Mario, vidu, mi kompatinda migranto venis kun malplenaj manoj, ĉar en ĉiuj ĝardenoj de Nazaret mi ne trovis floron, kiu estus inda al Vi, kiu estus inda al via beleco kaj ĉasteco.

Kaj la Virgulino ne respondis ion, nur klinis sian kapon.

—Bela vi estas, mia Estrino, bela—diris denove la Junulo—, plej bela inter ĉiuj virgulinoj kaj estas malriĉa la tero, malriĉa kaj senpova por kreskigi floron indan al Vi!

Dirante tion, li rememoris la florojn de l' ĉielaj ĝardenoj kaj ke li estus povinta kunporti de tie, se li ne estus forgesema.



Kaj pensante pri tio, ankaŭ songante li malĝojiĝis tiel, ke li ekploris.

Songante ploris la Anĝelo kaj malkviete sin turnadis, dume lia kapo deglitis de liajflugiloj kaj tuŝis la floran herbejon kaj tien, sur la herbon, falis el lia fermita okulo unu sola, brilanta varmega larmoguto, kiun ploris la forgesema Sendito tial, ĉar li ne kunportis floron el la ĉielaj ĝardenoj...

Kaj super li, en la lumo de leviĝanta suno, mirante staris la infanoj de la naturo, la fruemuloj. La papilioj, abeloj, birdoj, la skarabetoj kun brilantajflugiloj kaj la altaj herboj kaj kampofloroj ĉiuj, kaj rigardis la elfalintan larmoguton, kiu estis brilanta pli, ol ĉiuj rosogutoj. Ĝi estis tiel granda, kiel iu ronda, radianta diamanto, aŭ iu granda, valora perlo.

Kaj la larmoguto falis sur la brunan teron kaj la tero ensorbis ĝin kun avida ĝojo kaj jen, kie ĝi ensorbiĝis, post kelkaj minutoj ekĝermis malgranda verda ĝermeto, tute proksime al la kapo de la Dormanto, inter liaj duflugiloj. Kaj la ĝermeto kreskis, kreskadis kaj grandiĝis. La mateno verŝis sur ĝin sian freŝan, vivigan forton, la suno flegadis ĝin per sia delikata varmo kaj la abeloj, birdoj kaj zumantaj skarabetoj ĉirkaŭkaresis ĝin.

Kreskis la eta ĝermo kaj baldaŭ ĝi fariĝis gracia kaj brila trunketo de floro. La abeloj kaj papilioj miris pri tio. Neniama ili vidis ankoraŭ kreski floron tiel rapide, kvankam ili konis la sekretojn de la naturo.

Kaj dum daŭris la sonĝo de la Anĝelo, la trunketo de la floro ĉiam grandiĝis, li trovis apud si plenflorantan, freŝan en matena pompo, ĉirkaŭzumatan de gajaj abeloj, grandiozan, plenan lilion.

La junulo ĝojkriis en sia animo vidante la lilion, kiu estis pli blanka, ol ĉiuj teraj lilioj kaj dolĉe bonodora, kvazaŭ ĝi portus en si la parfumon de mil ĝardenoj.

Li leviĝis ĝojege, ŝiris per sia blanka mano la floron, kiu naskiĝis el lia larmo dum sonĝo elplorita; li ŝiris ĝin kaj kun suprenlevita mano ekiris al la dometo, kien li estis sendita.

Post la floro, kiel narkotita, feliĉa, ebria procesio, iris en granda aro la koloraj, matenaj papilioj, la orflugilaj libeloj, kantantaj birdoj kaj centspecaj skarabetoj kaj ĉiu kantis en sia sekreta lingvo la himnon de la Saluto.

Kaj kantis sur la kampo la riveretoj, kantis la sunlumo  
 kaj kantis la matena venteto, kaj kiel du samaj harpoj so-  
 nis ambaŭ belegajflugiloj de la Sendito kaj pleniĝis de  
 muziko Tero kaj Ĉielo, kiam li eniris tra la pordo...

Trad. JENO SZABÓ.

(Premiita de la Internaciaj Floraj Ludoj.)



#### BIBLIOGRAFIO.

Ni petas ĉiujn Esperanto-eldonistojn sendi al ni por  
 recenzo du ekzemplerojn de ĉiu eldonita verko, kaj ni pro-  
 mesas aperigi indan kritikon pri ĝi, post konscia tralegado.  
*Ni ankaŭ akceptos deponon de ĉiu recenzita libro, por  
 vendado al niaj legantoj.*

En la proksima numero ni aperigos recenzojn pri: **LA  
 TAJDO**, liriko, de Nikolao Hohlov, kaj **LA TRAGEDIO  
 DE L' HOMO**, drama poemo, de Emeriko Madách, el la  
 hungara lingvo tradukita de K. de Kalocsay.

Ni intencas ankaŭ regule recenzi ĉiun numeron de tiuj  
 esperantaj gazetoj, kiuj sendos al ni du ekzemplerojn.

## LA VESPERMANGŬO DE LA KARDINALOJ.

*Unuakta teatraĵo. — Lasta sceno.*En Romo, ĉe la Vatikano; XVIII<sup>a</sup> jarcento.

Kardinalo de Montmorency, franco; Kardinalo Rufo, hispano; Kardinalo Gonçaga, portugalo.

*Kardinalo de Montmorency*

Vi diru, Eminenco!

*Kardinalo Rufo*

Respondu, Kardinal'!

*Kardinalo Gonçaga*

Nu, ke estas alia la am' ĉe portugal'!  
 Ĝi — nek frazo subtila, nek kuraĝa duel'...  
 Ĝi estas kora amo, la nia! korfidel'!...  
 Ia larm'... Ia kiso... Ĝojanta sonoril'...  
 Li kaj ŝi al la templo irantaj kun trankvil'...  
 Tre simple... Ia amo, kiu rozojn ekfloras...  
 kiu, malgaja, kantas... kaj, en la ĝojo, ploras!  
 La amo-naiveco, la amo ideala!...  
 Kiom amj vi scias, bona gent' portugala!  
 Plekti kison sunbrilan, kaj jam de l' infanec'  
 per ĝi kunigi amon kun ĝoja amikec',  
 en ĉasta amfervoro, en paca korinklino,  
 ne distingante inter fratin' aŭ fianĉino...  
 Ia ama mistero kunfandanta ja ĉion,  
 de l' floroj disdonanta la belan harmonion,  
 kvazaŭ ĉies amsentoj estus nur unu am'...  
 Inter la amoj niaj estas granda malsam'!

*Kardinalo Rufo*

Vi amis, Eminenco?

*Kardinalo Gonçaga*

Jes, amon sentis mi!

Ĉe mi certe neniu povas vivi sen ĝi,

ne sentante ĉe l' koro — vivantan kvazaŭ flor' —  
 benatan nostalgion je rido kaj je plor'! —  
 Mi ankaŭ amis! — Tiam dek-kvin jarojn mi havis.  
 Ŝi dek-tri. Ia amo de infanoj nin ravis  
 kvazaŭ nubo helplena de aŭrora karmin'...  
 Ŝi frate min amadis per amo de kuzin'.  
 Mi ne scias ĉu estis ŝi bela aŭ nebela...  
 sed kia dolĉesprimo kaj rigardo lumhela!  
 Ridante mi ŝin vokis por mia virineto...  
 Tiel dolĉe ludadis kun mi l' amikineto!...  
 Konatoj kaj gepatroj diris ĉiam sen fin':  
 —“Por nia fil' ne estas pli bona fianĉin',  
 nek estas ĉe l' vilaĝo knabin' pli simpatia!”  
 Kaj, vidante ŝin bela, mi ŝin imagis mia!  
 Tre ofte, laciĝintaj de ludo kaj petol',  
 ni restis rigardantaj nin kun muta paro',  
 tutkovrataj de suno, kvietaj nur pro laco!  
 Ŝin, tiel belan, vokis al si la Dia paco...  
 kaj iun nokton nigran, malluman, mortis ŝi...  
 Kial vi, mia Dio, forprenis ŝin de mi?  
 Kial? kial, ho Dio?

*Kardinalo de Montmorency*

Eminenco!

*Kardinalo Rufo*

Sinjoro!

*Kardinalo Gonçaga*

Kial vi ne kompatis al mia juna koro?

*Kardinalo Rufo*

Eminenco!

*Kardinalo Gonçaga*

Vi certe ne vidis ke mi mortos!

Ke nenio konsolon al mi iam alportos!

Mi mortas...

*Kardinalo de Montmorency*

Eminenco...

*Kardinalo Gonçaga*

Vi scias pri l' fatal':  
nur ŝi, l' anĝel' mortinta, min faris Kardinal'!  
Kaj nun mi servas Dion vokintan ŝin al si...

*Kardinalo Rufo*

*(Al Kardinalo de Montmorency, forviŝante larmon, dum  
sonoras dek-unu horoj en la Vatikano.)*

El ni tri, la unika aminto estas li!

JULIO DANTAS.

Trad. el la portugala: JAUME GRAU CASAS, L. K.

### RILATO KUN HOMOJ, de Prentice Mulford.

Esti en rilato kun ĉagrenitaj aŭ senkuraĝe bagatelemaj homoj, ofte kunveni kun koleraj aŭ facile ekkoleriĝemaj, kun incitemaj homoj aŭ kun skeptikuloj, malutilas la sanon. Se vi mem estas eĉ tute plena da fido, plej energia kaj plej kuraĝa, eniros vin tamen el tiaj homoj iom da iliaj duboj, da ilia nedecidemo kaj malkuraĝo. Viaj pensado kaj volo estos kvazaŭ makulitaj. La malbonaj pensoj de aliaj, estu de kiu ajn speco, infektos vin pli aŭ malpli.

Sed vi estos nek influata de la spirito aŭ de la pensoj de aliaj, nek kontrolata, se vi serioze deziras, ke vi ne estu tia. Tia deziro de via spirito, ke vi liberiĝu de ĉio, kio povus plimalmultigi viajn forton kaj feliĉon, estas jam la samo kiel forto kaj feliĉo. La forteco estas la povo, per kiu vi povos konservi en viaj spirito kaj animo la senton de ĝojo kaj de feliĉo. Kiam vi foje gajnos ĉi tiun forton, vi estos la spiriton kaj la animon kaj la fizikaj okazintaĵoj de via vivo de si mem formiĝos kaj venos al vi obeante vin.

La leĝo pri harmonio inter la aferoj de la materiala mondo kaj inter tiuj de la mondo spirita, estas en sia efiko mirakle preciza. Homoj, kiuj vivas en ĉagreno, vidas ĉiujn aferojn ĉirkaŭ si malĝojaj kaj ĉagrenaj. La suferanto al-tiras la suferanton. Sed homoj, kiuj ĉiam perdas fidon kaj malesperas, sukcesas neniam. Ilia vivo estas peno por ili mem kaj por aliaj.

Homoj kolerantaj estas grandaj pekuloj. Ili ekhavas inciteman spiriton, la kolero iĝos ilia firma kutimo, kiun venki estas por ili ĉiam pli malfacile. La kolero disigas la korpon en pecojn kaj povas eĉ mortigi ĝin.

La forto de viaj korpo kaj spirito, viaj sukcesoj en la entreprenoj, la plezuro, kiun via ĉeesto kaŭzas al aliaj; ĉio dependas de la speco de viaj pensoj. Ĉiu via penso estas parto de vi mem kaj estas perceptata de aliaj kiel tia parto. Por esti agrabla kunulo, ne estas ĉiam necese paroli. La homoj, kiuj estas ĉirkaŭ vi, ekamos vin, se vi havos agrablajn pensojn. Ne estas ankaŭ necese, ke vi parolu, por iĝi malagrabla al aliaj. La homoj ekmalŝatos vin, se vi pensos malagrablajn pensojn. La magna forto de la homoj estas ilia penso, ilia spirito. Malĝojo, ĵaluzo, moko aŭ cinismo fortimigas, ĝojo, espero, la sincera volo fari

bonon al ĉiu renkontato, eĉ sole por la momento de la renkonto, tia spirito allogas.

Pli grave estas ol tio, kion vi parolas, tio, kion vi pensas. Se vi pensas hele, klare, pure, konvinkite kaj fideme, tiam vi signifas valoron, ĉiam kreskantan valoron, kien ajn vi iras. La homoj ĉiam ĝojos vin vidante. Vi alportos al ili ĝojon kaj forton, vi fortigos ilin ankaŭ korpe. Ili sentos sin pli sanaj, kiam ili vin vidos. Vi estas por ili fonto de sano kaj de refreŝiĝo kaj vi malebligos tiel eĉ plej malbonan humoron kaj senarmigos viajn grandajn malamikojn.

Se vi povas diri al vi mem: Mi rifuzas konsideri iun homon mia malamiko — tiam vi ne havos malamikojn. Se ni parolas pri “malamikoj”, kiujn ni “havas” kaj se ni daŭrigas en nia spirito iujn homojn konsideri niaj malamikoj, tiam ni faros el ili malamikojn, ĉar tiuj homoj ekkonos la specon de nia pensado. Ĝi estos elemento, kiu ilin alfluas kaj ilin malagrable tuŝas. Sed se fluas al ili viaj pensoj: “Mi ne estas via malamiko, ni ne volas havi pri vi malbonan opinionon — mi volas vin pli ami ol mi ĝis nun faris”, tiam ili baldaŭ sentos tiujn pensojn. Ili ne povos kontraŭstari ilian forton, ĉar la penso pri la bono estas ĉiam pli forta ol la penso pri malbono: tio estas natura leĝo.

Bonvolo utilas al nia korpo: ĝi faras nian sangon pli pura, niajn muskolojn pli fortaj, jes, ĝi ankaŭ ŝanĝas nian eksteraĵon kaj faras ĝin pli plaĉa. Ĝi estas la vera Elikŝiro de la vivo.

Via povo ekkoni la karakteron kaj ecojn de via kunulo, dependas ĉiam de tio, ĉu vi estas plene libera de malbonaj pensoj.

Rilatu ĉefe tie, kie estas via spiriteco plej multe ŝatata kaj bezonata. Tiam vi bonfaros al vi mem kaj al viaj kunuloj spirite kaj korpe. Vi ne estos jungita en malsaman jugon. Homoj, kiuj akceptas pensojn de via speco kaj redonas ilin al vi ŝanĝitajn en la filtro de ilia individueco, estas viaj proksimaj spiritaj parencoj. Unu kvazaŭ kreas en la koro de la alia kaj disiĝo signifas sole certecon pri nova retrovo en pli supera forto kaj matureco.

Trad. OTTO GINZ.

(Premiita de la Internaciaj Floraj Ludoj.)

## WALT WHITMAN.

Vivas en forta lando la maljunulo,  
 bela laŭ patriarko, sankta, serena.  
 Estas en lia frunto de potenculo  
 io reganta ĉiujn, noble solena.

Ŝajnas animo lia luma spegulo,  
 decus sur liaj ŝultroj mantel' ermena;  
 laŭte li per la harpo, kun ama brulo,  
 kiel profeto nova kantas senĝena.

Kvazaŭ pastro, pro forta ĉielinspiro,  
 anoncas li pri nova temp', estontec'.  
 Li diras: Flugu, aglo! Remu, marviro!

kaj: Laboru! vi homoj kun fortikec'.  
 Tiel agas Poeto dum sia iro  
 kun solena vizaĝo de Imperiestr'!

RUBÉN DARÍO.

Trad. el la hispana: JAUME GRAU CASAS, L. K.



## LA ESPERANTO-MOVADO EN IBERIO.

*Ni petas ĉiujn Grupojn, ke ili regule sendu al ni, por publikigo, informojn pri la gravaj okazintaĵoj. Prefere koncizajn raportojn pri novaj kursoj, propagandaj paroladoj, artikoloj sur ĵurnaloj, literaturaj vesperoj, k. t. p.*

SABADELL.— “APLEC Esperanta Grupo” estas societo fondita en la jaro 1908, kaj de post ĝia fondiĝo en ĝi oni okazigas kursojn sukcese ĉeestatajn. La nunaj kursoj disvolviĝas kun aparta sukceso, ĉar la superan praktikan kurson, gvidatan de la fervora esperantisto S—ro Jozefo Anglada, ĉeestas 26 gesamideanoj, kaj la elementan kurson partoprenas 28 gelernantoj.

Ekzistas ekskursaj fakoj, kaj grupeto, kiu okupas sin pri teatro: en nia societo mem oni ofte ludas kulturajn teatraĵojn.

Nia societo “APLEC Esperanta Grupo” havas sian sidejon en la strato Montserrat, 9, 1er., 1.<sup>a</sup>, Sabadell, kaj la estraro kunvenas ĉiun merkredon, de la 8.<sup>a</sup> ĝis la 10.<sup>a</sup> vespere. Ni povas havigi ĉiuspecajn esperantajn librojn ĉiutage je la dirita horo.— *Gregori Blay, sekretario.*

BARCELONA.— La 14 an de decembro 1930, dimanĉon, je la 10.<sup>a</sup> vespere, okazis en la malnova grupo BARCELONA STELO la Festo de l' Libro Esperantista, partoprenata de ĉiuj Barcelonaj grupoj. Altiris ĉies atenton bele aranĝita ekspozicio kaj tre provizita librovendejo zorgata de geedzoj Montserrat, el Barcelona, kaj samideano Marsà, el Terrassa.

S—ro Manuel Rodellar, prezidanto de BARCELONA STELO, per mallongaj vortoj malfermis la feston kaj transdonis la parolon al S—ro Delfí Dalmau, malnova esperantista batalanto.

La konata lingvo-instruisto kaj pedagogo, fondinto kaj direktoro de LICEU DALMAU (kun lernejoj en Barcelona, Sabadell, Terrassa kaj Manresa), faris brilan paroladon pri la eblecoj de la angla kaj esperanta lingvoj, kiel internacia komprenilo. Li diris, ke en pedagogiaj medioj oni inklinas spipovi *pasive* kiel eble plej grandan nombron da lingvoj kaj uzi *aktive* nur sian propran lingvon. Laŭ tio, ĉiu penus *kompreni* la aliajn en ilia lingvo kaj *komprenigi* sin en la lingvo propra. Li konkludis, ke la plej digna

kaj racia metodo, por internacia interkompreno, estas esprimi sin en Esperanto.

Poste sin turnis al la aŭdantaro S—ro Joan Gili Norta, prezidanto de KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO. Li klarigis la teknikajn malfacilaĵojn renkontitajn por impresi, el malnova vakscilindro, gramofondiskon ebligantan al la tutmonda samideanaro aŭdi la karan voĉon de nia mortinta Majstro. Por pli bone ilustrati pri la afero, li aŭdigis, per malnova aparato, malnovajn vakscilindrojn kun la "Preĝo sub la verda standardo", deklamita de la Barcelona samideano S—ro Alfons Sabadell kiu en 1909 havis la feliĉan ideon konservi en fonografa cilindro la voĉon de D—ro Zamenhof, kaj kun "La blinda bovino", kataluna poemo de Joan Maragall, deklamita de S—ro Josep Grau Casas, en la traduko de S—ro Vicente Inglada Ors. Tuj poste li aŭdigis, unuafoje ekster la laborejoj de la gramofona firmo "Odeon", la gramofondiskon enhavantan "La Espero" kaj "Dankparoladeto" elparolitajn de Zamenhof.

Kun vere religia silento oni aŭskultis la karan voĉon, kiu montriĝis aŭdebla nur de tre proksime kaj ne povis atingi ĉiujn angulojn de la granda salono. Tamen la emocio regis ĉiujn, kaj se nur la oraj vortoj de la dankparoladeto al la organizintoj de la V.<sup>a</sup> Universala Kongreso aŭdiĝis bone, la aŭskultantoj plenigis parkere kaj perkore la mankantajn verspartojn de "La Espero", deklamata plej solene kaj kortuŝe de ĝia aŭtoro mem. "En la mondon venis..." kaj tra bruo oni komprenas ke venis la "nova sento". "Ne al glavo..." kaj dum mallonga interrompo oni pensas pri tio, kion glavo soifas. Longa momento da nekompreno, pro tuta linio ne bone aŭdebla, kaj tuj oni konstatas, ke, se estus kompreno, ni havus "unu grandan rondon familian".

Fine parolis S—ro Jaime Grau Casas, direktoro de la ELDONA FAKO DE K. E. F., kiu eldonos kaj vendos la gramofondiskojn kun la voĉo de la Majstro, kaj li rimarkigis, post kelkaj aludoj al la trafaj paroladoj de samideanoj Dalmau kaj Gili Norta, kiom grandan valoron por ni esperantistoj havas tiu disko, eĉ ne tute sukcesinta, kiu, krom ĝia valoro de relikvo, adorinda por niaj koroj, plenumas la praktikan neceson scii kiamaniere paroladis la Majstro *sian* lingvon. Eĉ tra la neeviteblaj teknikaj mankoj de la disko, oni perceptas en la amata voĉo la tonon, la parolmanieron, la voĉfleksojn, kaj aŭdante tiun voĉon,

ŝajnas ke ni senfine povos ricevi konsilojn kaj ĉerpi kuragon. Antaŭ tiu flueto de voĉo, kiu tra dudek-unu jaroj elŝprucas nun preskaŭ neaŭdeble, ni ĵuru ke ni estos la laŭtparolilo aŭdigonta ĝin por jarcentoj al la tuta mondo.

Laŭ invito de la grupprezidanto parolis ankaŭ S—ro Angel Valdepeñas, iniciatinto de la Festo de l' Libro Esperantista en Barcelona, kaj li ĝoje konstatis la sukcesan disvolviĝon de tiu festo kaj admonis la esperantistojn al paco, frateco kaj homeco.

## EL MOVIMIENTO ESPERANTISTA MUNDIAL.

Nos proponemos reflejar en esta sección los acontecimientos de mayor importancia en el movimiento esperantista mundial. Sin incurrir en exageraciones, presentaremos siempre escuetamente los hechos que puedan tener alguna significación e influencia en el desarrollo del ideal esperantista: dotar a la humanidad de una lengua *auxiliar* internacional, dotar a todos los pueblos de un instrumento de intercomprensión.

Múltiples son los esfuerzos de los esperantistas, en todos los países, para hacer triunfar el ideal de una lengua internacional, y pueden repartirse en tres campos: propaganda, enseñanza y aplicación práctica.

De la propaganda cuidan los grupos esperantistas locales y las asociaciones de carácter nacional, organizando conferencias, repartiendo folletos, publicando revistas mensuales o quincenales, la mayoría de carácter bilingüe, algunas casi enteramente en lengua nacional. De éstas la mejor es la inglesa: "INTERNATIONAL LANGUAGE", y le siguen otras, de título parecido, en alemán, en polaco y en griego.

De la enseñanza de la lengua auxiliar se preocupan también las sociedades locales y nacionales, éstas últimas organizando principalmente cursos por correspondencia y por medio de emisiones radiofónicas. Existe en Arnhem (Holanda) un Instituto Internacional dedicado exclusivamente a la enseñanza del Esperanto, fundado por el abate Cseh, de Rumanía, y que lleva su nombre. El INSTITUTO JEAN-JACQUES ROUSSEAU, de Ginebra (Suiza), ha colaborado también eficazmente en el aspecto de la enseñanza de la lengua internacional y de su valor pedagógico. La Sociedad Esperantista Británica vende discos de gramófono para aprender el Esperanto. De la evolución natural, de la unidad, del léxico y de la gramática del Esperanto, se ocupa el COMITE DE LA LENGUA, formado por eminentes esperantistas de todos los países, cuya sede está en París.

Respecto a aplicación práctica del Esperanto, hay que mencionar en primer lugar a la ASOCIACION ESPERANTISTA UNIVERSAL, con oficina central en Ginebra, que cuenta con delegados en las principales poblaciones de todos los países civilizados y publica un valiosísimo

“Anuario”, con un sinnúmero de direcciones de esperantistas, y una interesante revista mensual. Dicha asociación es a base de individuos exclusivamente (unos 10.000) y junto con la REPRESENTACION de las sociedades nacionales para la propagación del Esperanto (unas cincuenta, con cerca de 100.000 asociados), elige el COMITE CENTRAL INTERNACIONAL DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA, en Ginebra, que es la suprema entidad esperantista en lo tocante a organización, estadística y celebración de los CONGRESOS UNIVERSALES. En Viena existe un MUSEO INTERNACIONAL DE ESPERANTO y en París una LIBRERIA CENTRAL ESPERANTISTA y una BIBLIOTECA con más de 5.000 volúmenes en Esperanto. En Colonia (Alemania) se publica un importante semanario (“HEROLDO DE ESPERANTO”) y en Budapest (Hungria) aparece una revista mensual de carácter literario (“LITERATURA MONDO”). De las casas editoriales que han editado en Esperanto, son dignas de nota: HACHETTE, de París; MOSSE, de Berlín; HIRT, de Leipzig; y ESPASA-CALPE, de Madrid.

Numerosísimas son las organizaciones internacionales esperantistas, de diverso carácter, que publican sus revistas y libros, y celebran sus congresos.

Las hay de carácter técnico (ciencia, medicina, pedagogía, radiofonía, comercio, turismo, ferrocarriles, policía, correos y telégrafos, etc.), de carácter político o social (pro Liga de Naciones, pequeñas nacionalidades, socialismo, comunismo, anarquismo); de carácter religioso (católicas, cristianas, teosóficas, de nuevas religiones de origen japonés, árabe, indio); de vegetarianos, naturistas, abstemios, librepensadores, deportistas, boy-scouts, eugenistas, partidarios del impuesto único, de la cremación, filatelistas, contrarios de la vivisección, etc.

Las más importantes asociaciones internacionales de esperantistas, después de la “Universala Esperanto-Asocio” (U. E. A.) que, como hemos dicho, cuenta 10.000 miembros, son la “Sennacieca Asocio Tutmonda” (S. A. T.) con 8000 miembros, partidaria de un extremado internacionalismo y de la lucha de clases, y la “Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista” (I. K. U. E.) con 6000 miembros, de carácter católico, fuertemente proselitista.

En sucesivos números publicaremos detalladas infor-

maciones del carácter, estructura y desenvolvimiento de cada una de las diversas organizaciones esperantistas e iremos dando noticia de los progresos que, lenta pero continuamente, va haciendo el Esperanto.



#### ADMINISTRACIA AVIZO.

Tiu ĉi unua numero estas sendita al multaj Iberiaj gesamideanoj, kiuj ne abonis nian Revuon, eĉ ne sciis pri ĝia apero. Se ĝi plaĉas al ili, ili bonvolu sendi al ni sian abonon por jaro aŭ eĉ por duonjaro: la ekzisto de IBERIA ESPERANTISTA REVUO, almenaŭ por 1931, estas certigata. Se ĝi ne plaĉas al ili, ili bonvolu konservi senpage tiun ĉi numeron, kaj ili estas petataj skribi al ni dirante kion ni devus fari por atingi ilian aprobon.

Monsendu laŭ la adreso: S—ro J. Grau Casas, Diputación, 50, Barcelona.

---

Tiu ĉi numero estas submetita al la cenzuro, pere de la afabla helpo de samideano Luís Santamarina, polica oficisto.

EN LA PROKSIMAJ NUMEROJ APEROS:

PROBLEMO DE LA PATRECO, de Jakob Schmid.

LA SNURTIRO, de M. E. Francis. Trad. Louise Briggs.

ĈU IO BONA ESTIS EL NAZARET?, de Emma L. Osmond.

LA LINGVO ESPERANTA KAJ LA HEBREA, de Dr. Leopold  
Dreher.

LA ROMANO "JEAN CRISTOPHE" DE ROMAIN ROLLAND,  
kritika studo de Jozefo Major.

LA SANKTA GRALO, de Jakob Schmid.

LA BIENULINOJ, de Joseph Berger.

LA NOVA VIVO, de Ivan Sirjaev

PRI AKTORARTO, de Helena Hempel.

LA ĈARMO DE MUZIKO, de Emma L. Osmond.

L'ARLESANIÑO, de Alphonse Daudet. Trad. Jan van Schoor.

LA STELPLENA ĈIELO, LA PLEJ GRANDIOZA ARGUMEN-  
TO POR LA EKZISTO DE DIO, de Victor Kolb. Trad. Karl  
Friedl.

STUDOJ PRI LA LINGVO KAJ LITERATURO DE MALGRAN-  
DAJ POPOLOJ, de Ed. Jung.

SOCIA PROSPERADO, de J. Kramer.

ĈU LA BESTOJ ANKAŬ HAVAS ANIMON?, de Hans Win-  
disch-Sartowsky.

LA REĜO, de Francesco Pizzi.

**Abono al IBERIA ESPERANTISTA REVUO**

**Por Iberio:**

**Jaro: 9 pesetoj. Duonjaro: 4'50 ptoj.**

**Por aliaj landoj:**

**Jaro: 1 dolaro.**

**EKSTERLANDAJ ABONANTOJ SENDU  
UNU-DOLARAN BANKBILETON  
EN REKOMENDITA LETERO!**